programo

KONCERTO KUN SOLENA MALFERMO

K

en Druŝtveni dom Treŝnjevka (Kulturdomo de Treŝnjevka), Park V. Vlahoviĉa 1

2-an de aŭgusto 87
20-a ĝis 23-a horo

Post la malfermaj paroloj de la prezidantino de la Organiza Komitato, Neda Andriĉ kaj membro de prezidantaro de Unuiĝo de Socialisma Laborpopolo de Kroatio Marijan Radmiloviĉ sekvos koncerto en kiu kantos kanzonojn:
1. Koruso de Podlehnik (Jugoslavio)
2. Lada Kos (Jugoslavio)
3. Joszef Dinyes (Hungario)
4. Joelle Rabu (Kanado)

SIMPOZIO INTERNACIA "LINGVAJ PROBLEMOJ EN INTERNACIA KOMUNIKADO"

S

en Salono de Mjesna zajednica (Loka komunaĵo) Zrinjevac, Palmotiĉ str. 30.

S-1
3-an de aŭgusto 87
10-a ĝis 13-a

10-a h. Claude Piron "Kelkaj aspektoj de lingva komunikado en internaciaj organizaĵoj"
11-a h. Sinitiro Kawamura "La lingva problemo en internacia komunikado el la vidpunkto de japana natursciencisto"
12-a h. Li Shijun "Lingvoinstruado en Azio"

S-2
3-an de aŭgusto 87
15-a ĝis 18-a horo

15-a h. Klaus Schubert "Interreguleco kaj esprimivo - elektante interlingvon por perkomputila tradukado"
16-a h. Bart Papegaaij "Artefarita interlingvo per Esperanto"
17-a h. Blazio Wacha "Areaj, laŭplanaj kaj prisistemaj tendencoj en la evoluo de Esperanto"

S-3
4-an de aŭgusto 87
14-a ĝis 17,30 horo

14-a h. Hans Michael Maitzen "UN kaj la lingva problemo'
15-a h. Nikola Raŝiĉ "Cent jaroj da toleremo"
16-a h. Giordano Formizzi "Plurlingvismo kaj la Internacia Komunikado - pedagogiaj pripensoj"
17-a h. Rulph Harry "La diplomatoj kaj Esperanto"

TEATRA PROGRAMO

T

en Zagrebačko kazalište lutaka (zagreba Pupteatrejo), Str. 8. majo 35.

T-1
3-an de aŭgusto 87
20-a horo

Teatra grupo "MEJS" el Beograd (Jugoslavio)
M. Zablačanski "La Lasta Fadeno"

T-2
3-an de aŭgusto 87
22-a horo

SEKA GRUPO el Zagrebo (Jugoslavio)
K. kaj J. Čapek "El la vivo de insektoj"

T-3
4-an de aŭgusto 87
18-a horo

Bulgara Esperanto-Teatro (BET) el Sofio (Bulgario)
Fernando Arabal "Pikniko sur la batalkampo"

T-4
4-an de aŭgusto 87
22-a horo

Leningrada Esperanto-Teatro – LET (Sovetunio)
Dostojevski "La sonĝo de ridinda homo" kaj Shakespeare "Hamleto"

LITERATURAJ PROGRAMOJ

L

en Mjesna zajednica Zrinjevac, Str. Palmotiĉ 30

L-1
5-an de aŭgusto 87
20-a horo

Partoprenas C. Piron, P. Thorsen, T. Sekelj, S. Ŝtimec k.a.

L-2
6-an de aŭgusto 87
11–14-a horo

Kunveno de Esperantista Verkista Asocio kun prelegoj. Prezidas Tibor Sekelj

FILMA PROGRAMO

F en Mjesna zajednica Zrinjevac, Str. Palmotiĉ 30

F-1
7-an de aŭgusto 87
11–14-a horo

Dokumentaj filmoj de Krunoslav Tiŝljar
TEJO-kongreso 1973 en Sarajevo (30')
TEJO-kongreso 1978 en Poitiers, (25')
TEJO-kongreso 1979 en Austerlitz, (25')
Internacia renkontiĝo de Esperantistaj Familioj - Pag 1985 (30')
Esperanto - movado kaj kulturo - mozaiko de diversaj kulturaj eventoj kaj intervjuoj inter 1978 kaj 1986 (50')

F-2
7-an de aŭgusto 87
16–20-a horo

Instrufilmoj, turismaj filmoj, surbendiitaj teatraĵoj kaj pupteatraĵoj
Zagreba metodo - mallonga TV-instruado (6')
Zagreba metodo - "9-a leciono en elementa lernejo" (15')
Zagreba metodo - instrufilmo post la 1-a leciono (reĝisoris: R. Rožiĉ) (9')
Ĉinio kaj Turismo - filmo de TV-Pekino (30')
Universala Kongreso en Pekino kaj postkongresaj aranĝoj (20')
"Zagrebo-kongresa urbo" - filmo de turisma asocio de Zagreb (17')
Nuŝiĉ "Analfabeto" (filmita teatraĵo de Zagrebaj aktoroj (40')
Mozaiko de pupteatraĵoj el kelkaj pasintaj PIF-oj (Franca -Bululu, Montr ala-Kanada, Reykjavika-Islanda) (45')

F-3
8-an de aŭgusto
11–15-a horo

Artaj filmoj
"Angoroj" de A. Mahé (70')
G. Rodvanyi "En Eùropo ie" (70')
I. Ŝpoljarec "27" (25')
K. Tiŝljar - S. Ŝtimec "Gastamo" (45')

17,40-a horo

Rekta TV-elsendo (2-a programo) de TV Zagreb: "Joĉjo Pipro" - pupteatraĵo el ĈSSR en esperanto

PUPTEATRAJ PROGRAMOJ (ESPERANTA PARTO DE 20-a PIF)

P en Zagrebaĉko kazaliŝte lutaka (Zagreba Pupteatrejo), str. 8. majo 35 escepte de P-1 kiu okazas ekstere en Parko Zrinjevac

P-1
5-an de aŭgusto 87
18-a horo

Solena malfermo de la 20-a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) kaj Hungara Ŝtata Pupteatro el Budapeŝto "Foiraj pupludoj"

P-2
6-an de aŭgusto 87
10-a horo

Robert Banky kaj Giongyi Blasek el Budapeŝto "Neregulaj ludoj"

P-3
6-an de aŭgusto 87
16-a horo

Eta Teatro "Duŝko Radoviĉ" el Beograd "La Timema Lupo"

P-4
6-an de aŭgusto 87
21-a horo

Teatrao Pupella & Nogues el Genova (Italio): "Pupmozaiko"

P-5
7-an de aŭgusto 87
10-a horo

Infangrupo "Grilo" el Celldömölk (Hungario): "La Sorĉa Krusto"

P-6
7-an de aŭgusto 87
14-a horo

Pupteatro "Skomoroh" el Tomsk (Sovetunio): "Rusa Salo"

P-7
7-an de aŭgusto 87
21-a horo

Teatro "Tindipic kaj Teatro dell Aggeggio (Italio): "Pinokjo"

P-8
8-an de aŭgusto 87
10-a horo

Pupteatro "Pupilla" el Wells (Aŭstrio): "Doktoro Faust"

P-9
8-an de aŭgusto 87
20-a horo

Pupteatro "Compagnie theatrale Andre Morel" (Francio): "Kandido"

P-10
9-an de aŭgusto
10-a horo

FERMO de la tuta MANIFESTAĴO, proklamo de Lingva kaj Infana ĵurioj de PIF kaj Pupteatro "Optical - Figurenbühne" el Stuttgart (FRG): "Piroteknikaĵoj" (pupteatraĵo sen vortoj).

ekskursoj

Z1 URBOTRARIGARDO

la 4-a de aŭgusto
9–13-a horo

Transporto: aŭtobuso
Manĝo: –
Eco: Aŭtobusa ekiro de la loĝejoj. Vizito de la malnova urbokerno Kaptol, de la katolika neogotika preĝejo St. Stefano (19a jarcento). Vizito de la bazaro Dolac (lignaj kaj lanaj manlaboraĵoj). Vizito de la katolika preĝejo Sankta Marko.
Ekiro: De antaŭ la hotelo "International"
Prezo: 23 n. guld.

Z2 LA LAGOJ PLITVICE

la 5-a de aŭgusto
7–17-a horo

Transporto: aŭtobuso
Manĝo: Tagmanĝo en nacistila restoracio
Eco: Unu el la plej belaj naturregionoj de la mondo. Oni ekskuras preter, sub kaj sur la lagoj piede, perŝipe kaj per eta elektra aŭtobuseto. La 16 lagoj estas interligitaj per sennombraj akvofaloj kaj kaskadoj.
Ekiro: De antaŭ la hotelo "International"
Prezo: 77 n. guld.

Z3 KUMROVEC – KRAPINA – TRAKOŠČAN

la 3-a de aŭgusto
14–21-a horo

Transporto: aŭtobuso
Manĝo: vespermanĝo
Eco: Aŭtobusa vojaĝo al la vilaĝeto Kumrovec – – naskiĝloko de prezidento Tito. Halto en Krapina. Vizito de la katolika baroka preĝejo Trški Vrh el la 17a jarcento. Vizito de la prahistoria trovejo Hušnjakovo, kie estis trovita homo crapiniensis (antaŭ 40.000 jaroj). En Trakošĉan vizito de la baroka kastelo kaj ĝia riĉtrezora muzeo. Promeno ĉe la lago.
Ekiro: De antaŭ la hotelo "International"
Prezo: 52 n. guld.

Z4 VARAŽDIN – ŠAULOVEC – M. BISTRICA

la 6-a de aŭgusto
14–21-a horo

Transporto: aŭtobuso
Manĝo: vespermanĝo
Eco: Duhora aŭtobusa vojaĝo. Halto en la tradicia katolika pilgrimejo Marija Bistrica: vizito de la preĝejo el la 13a jarcento kaj de diversaj etaj tradiciaj metiejoj (mieltrinkejoj, vaksejoj, mielkukejoj). Trarigardo de la baroka urbo Varaždin, iama ĉefurbo de la respubliko Kroatio. Vespermanĝo en la kastelo Saulovec (18a jarcento).
Ekiro: De antaŭ la hotelo "International"
Prezo: 43 n. guld.

libroservo

Dum la Aranĝo funkcios LIBROSERVO de Internacia Kultura Servo en Esperanto -Centro, strato Amruševa 5/I, ĉiutage de la 9 – 13 h.